

II karesma dimanĉo – 16an de marto 2014

**Lia vizaĝo brilis kiel suno. – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

**El la evangelio laŭ Mateo 17, 1-9**

**En tiu tempo Jesuo prenis kun si Petron, Jakobon kaj Johanon, fraton de Jakobo, kaj kondukis ilin sur altan monton aparte. Tie antaŭ ili Li transfiguriĝis: lia vizaĝo brilis kiel suno kaj liaj vestoj fariĝis blankaj kiel lumo. Poste aperis al ili Moseo kaj Elija, kiuj parolis kun Li.**

**Tiam Petro diris al Jesuo: "Sinjoro, estas bone por ni esti ĉi tie. Se Vi volas, mi pretigos ĉi tie tri tendojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija". Dum li ankoraŭ parolis, jen luma nuboj kovris ilin, kaj el la nuboj aŭdiĝis voĉo diranta: "Ĉi tiu estas mia amata Filo, kiu plaĉas al Mi, aŭskultu Lin!".**

**Aŭdante tion, la disĉiploj pro granda timo falis sur sian vizaĝon. Sed Jesuo alproksimiĝis, ektuŝis ilin kaj diris: "Leviĝu, ne timu!". Ili levante siajn okulojn neniu vidis, krom Jesuo sola.**

**Kaj dum ili malsupreniris de sur la monto, Jesuo ordonis al ili: "Rakontu al neniuj la viziojn, ĝis la Filo de la homo releviĝos el la mortintoj".**

La evangeliisto Mateo prezentas la respondon de Jesuo al la tentoj en la dezerto. La tria, la lasta tento en la dezerto, estis tiu kiam la diablo portis Jesuon sur altan monton – la alta monto indikas la dian kondiĉon – proponante al li ĉiujn regnojn kaj la gloron de la mondo. Praktike la inviton, la altiron, la tenton al Jesuo konkeri la dian kondiĉon, akirante la povon por superregi.

Por kompreni tiun ĉi tenton oni devas memori ke, je tiu epoko, ĉiuj tiuj kiuj superregis sin konsideris en dia kondiĉo, kiel la faraono, kiu estis iu diaĵo, la romia imperiestro kiu estis filo de iu diaĵo, la diablo do proponas al Jesuo la dian kondiĉon pere de la superrego. Bone, la epizodo de la transfiguriĝo estas la respondo de Jesuo al tiu ĉi tento.

Ni vidu la ĉapitron 17 de la evangelio de Mateo. "*Ses tagojn poste*", la indiko estas grava. "*Ses tagojn poste*" revokas du gravajn okazaĵojn: la kreon de la homo en la libro de Genezo kaj kiam Dio manifestas sian gloron sur monto Sinajo. Do la cifero "ses tagojn" revokas du aferojn: la kreon de la homo kaj la gloron de Dio. La evangeliisto volas pruvi ke, en Jesuo, manifestiĝas la pleneco de la kreado kaj, kun ĝi?, la gloro de Dio. Kaj ni vidos la kialon. "*Jesuo prenis kun si Petron,*" la disĉiplo estas prezentita per sia negativa kromnomo, kiu signifas "la obstina, la malmolkapa", "*Jakobon kaj Johanon*". Ili estas la tri malfacilaj disĉiploj, ili estas tiuj kiuj lin tentas al povo.

Kiam Jesuo anoncos ke en Jerusalemo li estos mortigota, estos Johano kaj Jakobo kiuj petos al li kundividi kun ili la plej gravajn postenojn. Nu, Jesuo prenas kun si Petron, kaj Petro, en la antaŭa epizodo, estis objekto de la plej perforta denunco, de la plej akra epiteto adresita de Jesuo al iu disĉiplo. Jesuo lin vokis "satano". "Iru for, satano!" La samaj vortoj per kiuj Jesuo rifuzis la tenton en la dezerto.

Sed al Petro li donas unu ŝancon, "Iru for satano, refoje metu vin malantaŭ min", ĉar Petro volis li indiki la vojon de Jesuo, kaj precipe Petro malakceptis la ideon de la morto de Jesuo, ĉar por Petro la morto estis la

fino de ĉio. Jesuo do prenas nun kun si sian satanon kaj respondas al la tento de Petro kaj al tiu de la dezerto.

*"Kaj kondukis ilin aparte"*, kiam ni trovas la esprimon "aparte", tio estas faka termino utiligata de la evangeliistoj, kiu volas ĉiam indiki kontraŭecon, nekomprenon, flanke de la disĉiploj aŭ de aliaj, al Jesuo kaj al lia mesaĝo. *"Sur alta monto"*, jen, samkiel la diablo portis Jesuon sur tre altan monton, jen Jesuo portas sian diablon, sian tentanton, Petro, sur altan monton, la lokon de la dia kondiĉo.

*"Tie antaŭ ili Li transfiguriĝis"*. La dian kondiĉon, laŭ Jesuo, oni ne akiras pere de la povo, sed pere de la amo, ne superregante, sed servante, ne forprenante la vivon, sed oferante la propran. La efiko de tiu orientado de la vivo al alies bonfarto, estas la transfiguriĝo. La morto laŭ Jesuo ne malgrandigas la personon, sed estas tio kio ĝin transfiguras. La morto do estas transfiguriĝo de la individuo. *"Antaŭ ili li transfiguriĝis, lia vizaĝo brilis kiel suno"*, tio indikas la dian kondiĉon.

Jesuo estis dirinta ke la justuloj brilos kiel la suno en la regno de la Patro, *"kaj liaj vestoj fariĝis blankaj kiel lumo"*, tiuj estas la koloroj de la anĝelo kiu anoncas la releviĝon. En Jesuo do manifestiĝas la efikoj de la releviĝo, la morto ne detruas la vivon, sed estas tio kio permesas al ĝi reburĝoni en nova, plena, kompleta kaj definitiva formo. Formo kiun en la tera ekzistado ne eblas atingi.

*"Poste aperis al ili Moseo kaj Elija"*, Moseo kaj Elija reprezentas respektive la leĝon kaj la profetojn, tiujn, kiujn ni nomas Malnova Testamento, *"kiuj parolis kun Li"*. Moseo kaj Elija estas du personecoj kiuj, en la Malnova Testamento, parolis kun Dio kaj nun ili parolas kun Jesuo. Ili havas nenion por diri al la disĉiploj. Ĉi tie la traduko diras "parolante", male la evangeliisto skribas *"reagis"*, do temas pri reago.

*"La Petro"*, la difina artikolo revokas la obstinan sintenon de tiu ĉi disĉiplo, *"La Petro reagis kaj diris al Jesuo: "Sinjoro, estas bone por ni esti ĉi tie. Se Vi volas, mi pretigos ĉi tie tri tendojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija"*. Estas en Izraelo festo tiom grava ke ne necesas ĝin nomi, ĝi estas dirata simple "la festo", temas pri la festo antonomazie, pli grava eĉ ol Pasko. Temas pri la festo de la tendoj, kiu memorigas la liberigon de la egipta sklaveco, kaj dum tiu semajno, inter septembro kaj oktobro, oni vivis en tendoj. Nu, memore de la antikva liberiĝo, oni atendadis kaj esperis, ke manifestiĝos kaj alvenos la liberiganto.

La mesio do manifestiĝos dum la festo de la tendoj. Jen do Petro daŭrigas sian rolon de tentanto, la satano de Jesuo. Kial? Kion li faras? Li diras *"se Vi volas mi pretigos ĉi tie tri tendojn"*, estis la festo dum kiu la mesio manifestiĝos, kaj ni rimarku la vicordon de tiuj ĉi tendoj, *"unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija"*. Kiam estas tri personecoj, la plej grava ĉiam estas en la mezo. Por Petro la plej grava, estas Moseo, ne Jesuo.

Petro rekonas en Jesuo la mesion, sed iu mesio laŭ la linio de respekto de la leĝo trudita de Moseo. La mesio estos estinta pia devota observanto de ĉiuj normoj de la leĝo, kaj precipe, kiel Eija. Elija estis la zelota profeto, tro zelota eble, kiu persone murdis kvarcent kinvdek pastrojn de alia diaĵo. La mesio kiun volas Petro estas do tiu ĉi: iu kiu respektu la leĝon kaj ĝin trudu perforte kiel Elija.

*"Dum li ankoraŭ parolis, jen luma nuboj"*, la nuboj en la Malnova Testamento, estas signo de la dia ĉeesto, *"kovris ilin"*. Dio do ne samopinias kun tio kion estas diranta Petro. Li estis ankoraŭ parolanta, la Sinjoro do interrompas Petron. *"kaj el la nuboj aŭdiĝis voĉo diranta"* estas la voĉo de Dio, *"Ĉi tiu estas mia Filo"*, Filo indikas tiun, kiu similas al Patro en la konduto, ne nur, *"amata"* kiu indikas la heredonton, tiun kiu heredos ĉion, tiun do kiu havas ĉion de la Patro.

*"Kiu plaĉas al Mi"*. Estas la tute sama indiko kiun Dio eldiris pri Jesuo je la momento de la bapto. En la bapto Jesuo sin devontigis manifesti fidelecon al la amo de la Patro, ankaŭ riske de sia vivo, la respondo de Dio al tiu sindevigo estas vivo kiu kapablas superi la morton. La morto ne detruas la personon, sed ĝin potencigas.

Kaj poste jen la ordono *"aŭskultu Lin!"*. Ili do devas aŭskulti nek Moseon, nek des malpli Elijan, lin ili devas aŭskulti, nur Jesuon. Moseo kaj Elija estas relativigitaj kaj metataj en rilato kun la instruo kun la vivo de Jesuo. Tio kio de la leĝo aŭ de la profetoj akordas kun Jesuo estas bone akceptita, tio kio distanciĝas aŭ malas, estas preterlasita.

La reago de la disĉiploj. *"Aŭdante tion, la disĉiploj pro granda timo falis sur sian vizaĝon"*, fali sur sian vizaĝon estas signo de malvenko, de fiasko, ili do komprenas ke ili fiaskis. Ne estas tiu la mesio kiun ili estas sekvantaj, *"kaj estis kaptitaj de granda timo"*, ili do sentas sin venkitaj, ĉar la mesio kiun ili sekvas estas la mesio kiu ne mortas, kiu triumfas; male ili devas pravigi la vortojn de Jesuo kiu anoncis ke en Jerusalemo li estos mortigota.

Por ili tio estas signo de malvenko kaj nun ili ankaŭ timas kia povas esti la reago de Jesuo kiu estis de ili tiel kontraŭstarita. *"Sed Jesuo alproksimiĝis, ektuŝis ilin"* samkiel li faris al la malsanuloj kaj al la mortintoj, *"kaj diris: «Leviĝu, ne timu!»"*. La respondo de Jesuo estas ĉiam vivkomuniko. *"Ili levante siajn okulojn neniun vidis"*, Petro, Jakobo kaj Johano serĉas ankoraŭ Moseon kaj Elijan, ĉar tio estas la pasinto, tio estas la tradicio. *"Sed ili levante siajn okulojn neniun vidis, krom Jesuo sola"*. Ekde tiam ili devos fidi nur Jesuon, kaj ne plu fidi Moseon kaj lian leĝon aŭ en profetan fervoron de Elija.

*"Kaj dum ili malsupreniris de sur la monto, Jesuo ordonis al ili: «Rakontu al neniu la vizion, ĝis la Filo de la homo releviĝos el la mortintoj»"*. Tiu bildo de Jesuo kiu pasas tra la morto, morto kiu, ne nur ne lin detruas, sed lin potencigas, povintus esti misinterpretata, kiel triumfa signo, flanke de la disĉiploj. Ili ankoraŭ ne scias ke tiun kondiĉon Jesuo akiros pasante tra la plej misfamiga morto, tiu rezervita al la malbenataj de Dio, la morto de krucumito.